# *Raúl kaj Díaz-Canel vizitis la komandejon de la okcidenta armeo*



**Foto: Studio Revolución**

Havano, jan 24 (RHK) La gvidanto de la Kuba Revolucio, Raúl Castro Ruz kaj la prezidanto de la Nacia Defenda Konsilio (CDN), Miguel Díaz-Canel, vizitis la komandejon de la Okcidenta Armeo ?i-?a?don, kadre de la agadoj de la Strategia Ekzercado Bastión 2024.

En la kunveno, la estro de la Armeo, generalmajoro Ernest Feijoó, raportis pri la ?efaj agoj faritaj en la intereso de la armita lukto kaj la defendo de la Okcidenta Strategia Regiono.

La? raporto de la nacia televido, la laborsesio traktis anka? la partoprenon de la lo?antaro en defendaj taskoj kiel esenca principo de la kuba milita doktrino de Milito de ?iuj Homoj.
Membroj de la CDN, kaj la ?efaj gvidantoj de la Revoluciaj Armitaj Fortoj kaj la Ministerio de la interno partoprenis la renkonti?on.

En tiu ?i tago, la kuba ?tatestro anka? kontrolis la konstruadon de la Bastiono en la okcidenta provinco Mayabeque, kaj emfazis ?ian gravecon kadre de la preparo por defendo en la lando.

La evento, kiu kulminas hodia?, reprezentas la maksimuman esprimon de milita preparado je strategia nivelo, kaj estas esenca komponanto de la Defenda Persona Prepara Sistemo.

Fonto: PL

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/374920-raul-kaj-diaz-canel-vizitis-la-komandejon-de-la-okcidenta-armeo](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/374920-raul-kaj-diaz-canel-vizitis-la-komandejon-de-la-okcidenta-armeo)

**Radio Habana Cuba**